

# *Kluba Bulteno*

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2007

Vendredon la 31an de aŭgusto

55a jaro

---

## **Kunventagoj**

**Ĉiam je la 19a horo. Kie? – Vidu malsupre.**

**Mardon la 4an de septembro (semajno 36)** ni invitas al interparolado kun Espen Stranger-Johannessen. Inter eblaj temoj estas: Meksiko (kie li loĝis lastjare), la interreta E-kurso en Umeå (kiun li iniciatis), la persa lingvo (kiun li studetis en Irano), lia bicikladego tra Meksiko kaj Usono (de Gvatemalo al Kanado!) kaj sonregistrado de norvega literaturo por interreto (kiun li projektas). Espen ĵus venis de Hamar al Oslo por studi en la universitato.

**Lundon la 17an de septembro** (semajno 38). Ni vizitos Inger Richard kaj ŝian imponan ĝardenon sur Grefsen-ebenaĵo, okaze de ŝia 90-jariĝo 11. sept. kaj 70 jaroj da aktiva membreco en la kluboj de Horten kaj Oslo. Ŝi ĉiĉeronos nin en sia ĝardeno (kiun ŝi prizorgas sola) kaj kune ni serĉos vortojn kaj esprimojn en Esperanto por ĉio kion ŝi montros. Pro la transporto kaj manĝaĵo ni petas partoprenontojn antaŭanonci sin al nia oficejo. *Si fra på forhånd om du kommer.*

**NI KUNVENAS** je la 19a horo la **unuan mardon** kaj la **trian lundon** de la monatoj / *første tirsdag og tredje mandag i måneden* (krom / *unntatt* en ferioj) – do en oktobro mardon la 2an (semajno 40) kaj lundon la 15an (semajno 42) kaj en novembro mardon la 6an (sem. 45) kaj lundon la 19an (sem. 47).

En **unu el tiuj tagoj** vi povos interparoli kun Leif Arne Storset, kiu baldaŭ revenos post studjaro en Kalifornio (Usono) Vd. lian artikolon en *Inter Ni Dirite* (en *N.E-isto*) 2/2007.

En **aliaj** el tiuj tagoj ni planas okazigi **studrondon por progresantoj**. Pli pri ĝi vi povas legi sur la lasta paĝo.

Cetere se venos **vizitantoj el eksterlando**, ni provos aranĝi **kromkunvenojn / ekstramøter** kun ili. Ni kunvokos retpoŝte / telefone. Se vi volas esti informata, sed ne estas en la kluba retpoŝta listo (ricevas la *Bultenon* retpoŝte), bv. sciigi nin.

**Kunvenejo:** Olaf Schous vei 18 (enirejo Schouterrassen), 0572 Oslo. Buso 31 (aŭ tramo 17) al Rosenhoff kaj iru supren laŭ Båhusvn – aŭ malsupren de Sinsen T.

# OkazIS

## Lundon la 16an de aprilo

Algis kaj Harald prezentis la malnovan tabulan ludon Go – unue teorie kaj historie, poste per ludo en la praktiko. Kaj tio tiom longe absorbis la atenton de la ĉeestantoj, ke apenaŭ restis tempo por diskuti la plurajn gravajn administrajn aferojn.

## Mardon la 1an de majo

Claude Rouget (Tromsø) estis en Oslo kelkajn tagojn pro alia kunveno, do ni invitis lin rakonti pri sia lastjara studrestado en Hindio / Bharato. Li partoprenis 10-semajnan kurson en Pondicherry (sude de Madras / Chennai) pri hindiaj religioj, kadre de la organizo *Kulturstudier* – sendepende de, sed kunlabore kun la universitato de Tromsø. Specialstudon li mem faris pri la hindua spiritulo Sri Aurobindo (1872 – 1950), kiu fondis grandan komunumon, Auroville, en la proksimo. Claude forte rekomendas al ĉiuj viziti Hindion, por sperti la riĉan multon da kulturaj kaj sensaj impresoj.

Ni elektis tagon konvenan por Claude, sed ĝi estis ankaŭ la Unua de majo, kaj eble pro tio pluraj klubanoj estis alie okupitaj.

## Lundon la 21an de majo

Charlotte W. Jensen pasigis kvar semajnojn en Kostariko, lando senarme, 25-procente naciparka kaj plena de aliaj turistoj. Malgraŭ tuta manko de stratomoj en la ĉefurbo, San José, ŝi sukcese vizitis gastigeman esperantistan familion kaj faris rondiron

de la lando fotante erupciantan vulkanon kaj multajn ekzotajn bestojn.

## Mardon la 5an de junio

Unue ni interŝanĝis bonajn memorojn pri nia ĵus forpasinta membro, Tron Øgrim, kiun ni konis ne kiel rabian revoluciulon sed kiel lingvemulo kaj librovoranto, kiu sendis siajn filinojn al kongresoj en foraj kontinentoj.

Poste ni turnis nin al la temoj de la baldaŭa landa kongreso kaj tradiskutis la situacion de la Eldonejo. Ni konstatis ke unu el la ĉefaj defioj – ĉu ni formale malfondos ĝin, ĉu ne – estas trovi membrojn kiuj pretas mastrumi ties (reduktitajn) servojn.

## Lundon la 18an de junio

Ni mallonge kuncerbumis pri la kaŭzoj de la granda sukceso de la Interkultura Centro en la germana urbeto Herzberg – nun eĉ oficiale nomata "la Esperanto-urbo". Krom la Esperantaj komunaj aranĝoj kun la ĝemelurbo Góra en Pollando, oni ofte aranĝas altnivelajn seminariojn tie, kaj ĝi estas la sidejo de la germana E-instruista asocio. Ŝajnas ke la aktivuloj tie lerte flegis la rilatojn kun la urbaj instancoj, ne limigante sin al kulturo E-lingva. Esperanton ili ruze prezentas, en unu el siaj multaj informbroŝuroj, i.a. kiel helpilon por lerni la anglan.

## Sankta-Johana ekskurso

Deko da herooj kolektiĝis antaŭ la ĉefpordego de la Vigeland-parko sabaton la 23an de junio je la 18a horo por esti gvidataj tra la parko de nia E-parolanta ĉiĉeronino Kari Kalsås. Herooj ni estis, ĉar pluvegis tiom, ke ŝajnis, ke ĉiuj ĉielaj kluzoj estas malfermitaj. Laŭdire oni celebras la Sankta-Johanan tagon omaĝe al Sankta Johano Baptisto, sed se la superaj potencoj sendis al ni la pluvegon kiel bapto-akvon, ili evidente troigis la celebradon.

Ni decidis mallongigi la promenadon kaj kiom eble plej rapide subtegmentiĝi en la nova loĝejo de Pilar Menéndez kaj Otto Prytz en Arnstein Arnebergs vei 16, proksime al la parko. Tie aliĝis al la heroaro ankoraŭ kelkaj homoj, tiel ke ni fine estis 16. La lasta, Douglas Draper, longe ĉirkaŭbicikladis sub la pluvo, ne trovante la ĝustan vojon, kaj li alvenis, kiam la ceteraj jam pensis pri foriro.

Otto montris al la gastoj la loĝejon, dum Pilar pretigis la manĝaĵon: i.a. riĉenhavan fiŝsupon kaj selektaĵon de salita viando (*spekemat*) kun plata pano. La etoso ĉirkaŭ la tablo estis tiom bona, ke la gastigantoj ne kuraĝis interrompi la konversacion por prezenti programon.

Vetere la ekskurso estis fiasko, sed sociale ĝi devas karakteriziĝi kiel granda sukceso, almenaŭ laŭ la subjektiva opinio de unu el la gastigantoj,

Otto Prytz

## Ekskurso al Hamar

Sabaton la 11an de aŭgusto 8 personoj ekvojaĝis per aŭtobuso de Oslo al Hamar, profitante la bonŝancon, ke samtempe estis en Hamar la mondvojaĝantoj Espen Stranger-Johannessen kaj Stian Håklev. Inter tiuj ok estis kvar litovoj, Algis Kaspiravičius kun edzino kaj du infanoj, unu hispanino, Pilar Menéndez, unu anglo\*, Douglas Draper, kaj nur du denaskaj norvegoj, Asbjørn Lindh kaj Otto Prytz.

En Hamar, krom Espen kaj Stian, renkontis nin Egil O. Larsen kaj Per Engen. Egil gvidis nin tra la biblioteko de NEL, kies ĉefan kolekton en Hamar li mastrumas.

Poste ni iris al Hedmarksmuseet, sur la istmo apud la katedralo. Tie Stian lerte ĉiĉeronis en Esperanto. La muzea vizito finiĝis per parole komentata koncerteto de mezepoka muziko en la katedralo.

De la muzeo ni promenis al la hejmo de Espen, kiu regalis nin per bongusta veg(etar)ana manĝaĵo. Ni kaptis la okazon por informiĝi pri la vagabondaj spertoj de Stian kaj Espen.

La hejmenvojaĝo okazis per trajno. Bedaŭrinde la vetero estis pluvema dum la ekskurso, sed tio ne malhelpis la bonan etoson.

Otto Prytz

---

\*Ha jes, nun mi memoras: mi loĝis en Anglio antaŭ kvindek jaroj. – DD

## **Protokolo de la jarkunveno**, marte 2007.

La ĉefajn decidojn (t.e. la elektoj) ni jam anoncis per *Kluba Bulteno 2*, sed ni pretas sendi la plenan protokolon al petantoj.

### **Studrondo** por progresantoj /*studiering for viderekomme*.

Tri niaj membroj interesiĝas pri nova studrondo por progresantoj.

Eble ni prenu tradiciajn klubkunvenajn tagojn por tio (unuajn mardon aŭ triajn lundon de la monato)?

Se okazu studrondo (kaj se ne anoncos sin gvidonto), necesas elekti studlibron, ekz-e *Kunvojaĝu* (Paul Gubbins) 119 kr – ni havas 3 ekz. – aŭ la multe laŭdatan *Vojaĝu en Esperanto-lando* (Boris Kolker) 156 kr – ĝin ni devos mendi de UEA.

Ni planas decidi pri tio post la kunveno la venontan mardon (4. sept.). SE vi interesiĝas, sed ne povos veni tiam, ni petas ke vi sendu mesaĝon aŭ telefonon.

**Novaj Glumarkoj.** La klubo denove vendas ruĝajn glumarkojn 4 x 7 cm, nun ankaŭ kun la retroŝta kaj la interreta adresoj. Po 2 kr. Vidu cetere *Norvega Esperantisto 4*, kiu aperos baldaŭ.

### **Ni funebras**

Jon Rømmesmo mortis la unuan de aŭgusto pro ĵus konstatita kancero. Nekrologo aperos en *Norvega Esperantisto 4*. Ni aldonu ĉi tie ke en la lastaj jaroj nia klubo plurfoje ekskursis al lia hejmo apud Tyrifjord, kie Jon kaj lia familio agrable akceptis kaj regalis nin. Kaj tie kaj dufoje en Esperantonia ni ĝuis prelegojn de Jon – pri loka historio kaj pri Esperanto en la familio. Li estis plurkampe klera. Kelkaj klubanoj partoprenis en la funebra ceremonio en la preĝejo de Hole kaj en la posta memor-kunveno.

### **Retpoŝtaj adresoj**

Bv. uzi la retroŝtan adreson <oficejo[a]esperanto.no> por mesaĝoj kiuj koncernas la klubon aŭ libromendojn (aŭ la domkomisionon?) kaj <inform[a]esperanto.no> nur por *Ligaj* aferoj (do tutlandaj aferoj de NEL).

### **E-post Ĉu vi havas retroŝton, sed ricevis ĉi tiun Bultenon paperpoŝte?**

**HAR DU E-POST, men har mottatt denne Bulteno med vanlig post? Hvis du vil sende oss din adresse (al oficejo[a]esperanto.no), hjelper du klubben med å spare utgifter ved fremtidige utsendelser.**

---

Tlf. 22 35 08 94      www.esperanto.no/oslo      Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no  
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper